

# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 3+4/1983 ★ Kr 6,50



## Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 111 38  
Stockholm \* Telefon: 08 -  
11 74 34 \* EsperantoCentro  
är öppet måndag — torsdag  
kl. 17 — 19 \* Postgiro: 20 12-  
3, Esperantoförbundet \*  
**Medlemsavgift:**  
direktansluten medlem 65 kr,  
ungdomsmedlem t o m 20 år  
35 kr, familjemedlem (utan  
tidning) 25 kr \*  
Prenumerationsavgift för *La  
Espero* ingår i  
medlemsavgiften \*  
Medlemmar under 30 år får  
dessutom ungdomsförbundet  
SEJUs blad *ktp*.

## La Espero

Organ för Svenska  
Esperantoförbundet \*  
Adress: EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 11138  
Stockholm \* Ansvarig  
utgivare: Bertil Åkerberg \*  
Redaktör: Franko Luin,  
Myggdalsvägen 123, 135 42  
Tyresö, telefon hem 08-  
712 82 91 \* Prenumeration:  
65 kr per år, postgiro 20 12-3,  
Esperantoförbundet \*  
Tidningen utkommer med  
åtta nummer per år \*  
**Fotosats och tryck:**  
EsperantoCentro, Stockholm  
1983

## Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42  
Malmö \* Besöksadress:  
Möllevångsgatan 20 B \*  
Öppettider: 1 sept — 15 maj:  
onsdagar kl. 10 — 11,  
torsdagar kl. 17 — 18 \*  
Skriftliga beställningar  
expedieras hela året, även  
under sommaren \* Telefon:  
040-12 20 29 \* Postgiro: 578-5  
\* Expedition: Wivi Nilsson \*  
Styrelsens ordförande: Anita  
Lindblom

# HODIAŬ

## Persona pardonpeto

Jen la lasta numero de *La Espero*, kiun mi redaktas, almenaŭ por nun. Okazis, ke bonvolo, intencoj kaj planado tute ne plu sufiĉas por ke mi sukcesu aperigi *La Esperon* iom regule; kaj tion vi povis mem rimarki.

Preparo de gazeto postulas multan laboron: iuj devas verki artikolojn, iu(j) devas redakti ilin, la artikoloj devas fariĝi kompostitaj, t. e. fariĝi belaspektaj kolonoj da teksto, tiu teksto devas fariĝi paĝoj kun bildoj kaj titoloj, la paĝojn iu devas presi, la presitajn foliojn oni devas faldi, kunmeti, kunvinkti, tranĉi kaj fine enmeti, kiel pretan gazeton, en kovertojn, sur kiujn iu stampis vian adreson. Tiujn kovertojn devas ricevi iu poŝtoficejo por povi distribui ilin al viaj hejmadresoj.

Multaj homoj estas enmiksitaj en la laboro de *La Espero*, sed kelkajn partojn mi akceptis kiel mian taskon: redaktadon, parte verkadon de artikoloj, kompostadon, enpaĝigon kaj dum la lastaj tri jaroj ankaŭ presadon. Tio iel funkciis, dum mi ne havis infanon kaj dum mia profesia laboro (ĉar laboro poresperanta estas por plejparto de ni eksterprofesia laboro) permesis al mi eĉ eluzi kelkajn horojn en la oficejo por laboro per *La Espero*.

Sed la infano postulas pli kaj pli da tempo kaj la laborkondiĉoj radikale ŝanĝiĝis, tiel ke mi ofte okupiĝas per labortaskoj ankaŭ ekster la laborejo, anstataŭ kontraŭe. La tempoekvacio simple ne plu donas pozitivan rezulton.

*La Espero* tamen devas aperi kun informoj al la membroj. Kaj ĉar mi ne vidas eliron el la malfacila temposituacio, restas nur unu ebleco: peti ke aliaj surprenu la taskon aperigi la gazeton. Kun danko mi notas, ke tio solviĝis kaj ke mi povos estonte ekdormi sen la malbona konscienco, ke *La Espero* ankoraŭ ne estas preta.

Restas al mi nur la tasko ĝisrevidi kaj pardonpeti pro la teruraj prokrastoj ĉijaraj.

Franko Luin

## INNEHÅLL/ENHAVO

- 30/Hodiaŭ: Persona  
pardonpeto  
31/Sveda kongreso en Gävle en  
majo  
33/Karavana vojaĝo al  
budapeŝta UK  
34/Kelkaj eroj el ĉijara UK  
36/Memore al Björn Collinder  
37/TEMO:KANALOJ  
37/Kelkaj linioj pri svedaj  
kanaloj  
38/Blua rubando tra Svedio  
40/La kanalo de Säfte  
40/La kanalo de Dalslång  
41/La kanalo de Trollhättan  
41/La kanalo de Kinda  
42/Ny datatidning — på  
esperanto  
43/Europaklubben gillar  
esperanto  
44/Esperantonytt

La TEMO-paĝojn  
helpredaktis Ulf  
Ribers, Motala.

## Sveda kongreso en Gävle en majo

Tri aŭ kvar tagojn, depende de la maniero kalkuli, daŭris la ĉijara jarkongreso de SEF, la 77a laŭ ordo. Mi miras, ĉu ekzistas esperanto-organizaĵo, kiu tiom da fojoj kongresis kiom SEF.

La ĉijara kongreso okazis en Gävle meze de majo, kun printempo apenaŭ komenciĝanta. Ĉirkaŭ cent esperantistoj kolektiĝis en la Popola parko, kie situis la kongresejo. En aliaj lokaloj en la migradhejmo kolektiĝis gejunuloj de SEJU por propraj aranĝoj, sed ili estis kelkfoje videblaj ankaŭ en la Popola parko.

La partoprenantoj alvenadis dum la ĉielira ĵaŭdo, kiu estis festotago. kaj en la vespero estis la unua komuna aranĝo, tute neformala. Kaj simila neformaleco estis karakteriza por la ceteraj tagoj. Estis rimarkinde, ke la kongreso daŭris unu tagon pli: ne estis bezonate enpremi ĉiujn programerojn unu post la alia kaj rapidi por sukcesi pridiskuti ĉiujn demandojn. Kontraŭe: oni povis eĉ disponi pri tempo por privataj interparoladoj kaj ekskursetoj tra la urbo.

### Plejparte pri UEA

La vendredo estis grandparte dediĉita al UEA. Du eminentaj gastoj venis de la internacia organizo de la esperantistoj: el la centra oficejo en Roterdamo venis Stefan MacGill, ĝia ĝenerala direktoro, el Pécs en Hungario Flóra Szabo-Felső, ĝenerala sekretario de UEA. Per iliaj intervenoj la informoj pri la laboro de UEA fariĝis tre detale prezentitaj kaj eĉ "maljunaj vulpoj" devis konfesi, ke multajn el la detaloj ili ne konis.

Samtage okazis ankaŭ grupaj diskutoj de la reprezentantoj de la kluboj, dividitaj laŭ regiona aparteno: suda, okcidenta, meza kaj norda.

Plian kontribuon donis dum la vendredo Barnabas Batta en Hungario, kiu prezentis la ĉijaran kongreslandon, kiu ĝuste estas Hungario.

### Informado sur la placo

La sabata antaŭtagmezo estis dediĉita al informado pri esperanto sur la stratoj kaj

placoj de Gävle. Tiun informadon organizis la membroj de SEJU kaj realigis ĝin kun la helpo de multaj pli aĝaj kongresanoj. El la stoko de Esperanto-Centro en Stokholmo oni venigis aron da diversaj informbroŝuroj kaj eĉ informan numeron de *La Espero*. Tion oni disdonadis al preterpasantoj kaj butikumantoj, kune kun speciala invitilo al enkonduka kurso dum la sama posttagmezo. Multaj esperantistoj kaptis la okazon diskuti pri esperanto kun la gävleanoj. Ne estis nekutime aŭdi neesperantistojn diskuti inter si pri la paperoj ricevitaj aŭ interese legi en la ricevita gazeto.

alia konferenco kun partoprenantoj nordiaj. Kelkaj esperantistoj renkontis en la fervoja muzeo la partoprenantojn de tiu konferenco, inter kiuj ili rekonis la eksterlandan ministron Lennart Bodström, la antaŭan sindikatan ĉefon Gunnar Nilsson, la ĉefon de Reso, Georg Ganneby, kaj la ĉefon de KF, la koopera unuiĝo. Pri ilia konferenco ne aperis eĉ vorto en la loka gazetaro.

### Jarkunveno de SEF

La jarkunveno de SEF okazis en la sabata posttagmezo kaj havis nekutiman gvidanton: la

komitato de UEA de Märtha Andréasson kaj Roland Lindblom, kiel ĝis nun. Pri venontjaraj elektoj cerbumos dum la jaro Aino Åberg, Lisbet Andréasson kaj Karl Gustafsson, membroj de la elektoprepara komitato.

Iom da diskuto kaŭzis tagorda punkto pri elekto de reprezentantoj de SEF en la estraro de Sveda Esperanto-Instituto, kion la estraro de SEF decidis prokrasti ĝis pli posta okazo. Olle Olsson plendis, ke la instituto ne povas labori sen taŭga statuto. Tiu diskuto fariĝis sufiĉe longa, sed multaj povis partopreni ĝin pro nekono de la problemoj kaj manko de konkreta propono.



ĝeneralan sekretarion de UEA. Malgraŭ malsamaj kutimoj pri kunventekniko la kunveno bone funkciis kaj sukcesis fari la decidojn, pro kiuj ĝi estis kunvokita.

La jarraporto estis rapide pritraktita (legu specialan artikolon pri ĝi), same kiel la elektoj. Plejparte okazis reelektoj. Kiel prezidanto ankaŭ dum la venonta jaro funkcios Roland Lindblom. La ceteraj reelektitaj estraranoj estas Karin Strandberg, Kerstin Rohdin kaj Niklas Gustavsson, kaj Åke Rohdin kiel anstataŭanto. Ordinara revizoroj estas Åke Blomberg kaj Bertil Bengtsson (nova), dum la anstataŭantoj restas Nils Erik Kristoferson kaj Leif Gunnar Nordenstorm. SEF estos reprezentata en la

Simila disdonado de informiloj estis aranĝita ankaŭ dum la pasintjara jarkongreso en Nyköping kaj ĝi rezultigis kurson dum la aŭtuno, en urbo, kiu eĉ ankoraŭ ne havas esperantoklubon. En Gävle tia klubo ekzistas, do oni devus povi atendi bonan rezulton.

### Proponoj al la jarkongreso

Erik Swärd el Malmö, kiu interesiĝas pri poŝtmarkoj, speciale pri esperantaj poŝtmarkoj, opinias, ke 125-jariĝo de Zamenhof la 14an de aprilo 1984 estus tre taŭga okazo por eldono de sveda memoriga poŝtmarko. Ĉar li scias, ke la sveda poŝta administracio bezonas multe da tempo antaŭ ol ĝi povas decidi ion, li proponas, ke SEF tuj ekpaŝu kun koncema propono.


SEF jam spertis, ke la poŝta administracio estas malfacile persvadebla, ĉefe okaze de la Universala Kongreso en 1980, kaj ne kredas, ke 125-jariĝo de Zamenhof povas esti akceptota de la administracio. Sed por la 100-jara jubileo de esperanto en 1987 oni absolute klopodu, ke ankaŭ la sveda poŝta administracio kontribuu per poŝtmarko. Tiun rimarkon de la estraro ankaŭ la kongreso akceptis.

En alia propono SEJU levas la demandojn de sia reprezentitigo en la jarkunvenoj de SEF. SEJU nun tute ne estas reprezentita kaj dezirus estonte rajti je sama reprezentitigo kiel, ekzemple, klubo.

La estraro priparolis la demandojn kaj proponas, ke

oni pristudu ĝin kunlige kun similaj demandoj pritraktotaj dum diskutoj pri statusŝanĝoj. Kun tio kaj SEJU kaj la jarkongreso konsentis.

La esperantoklubo de Falköping faris du proponojn: unu temis pri pretaj programoj uzublaj por dissendo de la lokaj radiostacioj, kiujn SEF preparu, alia pri prelegantoj, kiuj vizitu la lokajn klubojn. Ambaŭ demandoj estas pozitive pritraktataj de la estraro de SEF, kun la aldono, ke la estraro volonte subtenos ĉian laboron tiakampe, se prezentiĝas kandidatoj, kiuj volas fari tiun laboron.



Aldone estis pridiskutitaj pluraj proponoj de la klubo de Motala, kiuj tro malfrue alvenis al la estraro. Tiurilate la estraro rimarkigis, ke proponojn oni povas sendi al la estraro kiam ajn dum la jaro, oni ne nepre atendu ĝis la postlasta momento. Sten Svenonius el Malmö atentigis, taskigita de sia klubo, pri la graveco, ke *La Espero* aperu akurate.

Per tio kaj kantado de la himno la ĉijara jarkunveno finiĝis.

## Karavana vojaĝo al budapeŝta UK

La penso aranĝi karavanon al la UK de Budapeŝto naskiĝis antaŭ unu jaro. Dum kelkaj malhelaj vintraj monatoj mi timis, ke la aŭtobuso ne estos plena. Poste montriĝis, ke ni finfine estis 11 genorvegoj kaj 40 gesvedoj, de plej diversaj aĝoj kaj profesioj. La plej juna estis 6-jara (fariĝis 7-jara dum la vojaĝo. Eĉ kvin el ni festis naskiĝtagan datrevenon dum la vojaĝo. Ses gejunuloj partoprenis kaj plej multajn el ili ni transportis al la IJK en Debrecen plej oriente en Hungario — en la sovaĝa Granda ebenaĵo.

### LA EKVETURO

Frumatene la 20-an de julio ĉiuj vojaĝemuloj kolektiĝis apud la centra stacidomo de Malmö. La granda luksa aŭtobuso, preskaŭ duetaĝa, baldaŭ ekruilis suden tra Danlando. Post bongusta surŝipa manĝo ni atingis la kontinenton. Vespere en Paderborn ni renkontis Alicjan Sakaguchi, kiu laboras en la universitato tie. Ŝi rakontis pri sia laboro kaj parolis tre belsonan kaj tre belkonstruitan esperanton, kiun ni ĉiuj ĝuis, eĉ se la tre fakan enhavon kelkfoje ni iom malfacile povis sekvi.

En la hotelo en Linz atendis nin grupo da geesperantistoj. Ili multe laboris per aranĝo de SAT-kongreso, kiu, bedaŭrinde, okazis samtempe kun la UK. Tamen multaj venis por gvidi nin tra la urbo. Ni promenadis kun ili en malgrandaj grupoj.

### EN HUNGARIO

En la vespero, kiam ni atingis Abaliget, ni havis preskaŭ biblian travivaĵon. Ni alvenis, kiam estis jam malhele, kaj de ie alvenis du esperantoparlantoj. Post kelkaj enkondukaj

vortoj la manĝo estis en la manoj kaj buŝoj de 51 personoj post nur kelkaj minutoj. Multaj el ni vere admiris la bonan akcepton.

34 personoj el la grupo restis tie por esti amikoj de la naturo. La ceteraj tranoktis en tre komforta hotelo apud la moskeo en Pécs. Flora Szabo-Felsö, la ĝenerala sekretario de UEA, afable montris al ni la urbon, antaŭ ol ni ĝin forlasis survoje orienten. En Cegleg ni "metis" la KELI-anojn sur trajnon al Budapeŝto, de kie ili vojaĝis kun la KELI-rupo al Esztergom, kiun ili sukcesis atingi sub la sekura gvido de Olle Olsson.

Post la antaŭkongresaj aranĝoj la tuta grupo rekolektiĝis en la komforta hotelo Volga en Budapeŝto, kie ni havis kaj bonajn kaj sufiĉe malmultekostajn ĉambrojn.

### LA REENVOJAĜO

post du interesaj semajnoj en Hungario ni estis pretaj komenci la reenvojaĝon tra la ĉefurboj de centra Eŭropo. En Vieno atendis nin Signhilde Stamm, kiu kun tre granda kono pri la urbo vere konatigis al ni Vienon dum la mallonga tempo, kiam ni estis tie (vespero kaj posta tago). La duan vesperon ni kun 100 esperantistoj el kvin kontinentoj, kiuj partoprenis la postkongreson, ĝuis la novan vinon kun ŝafinlakta fromaĝo kaj dikaj pecoj da ŝinko.

La tago de Prago estis samtempe la tago de la katastrofo de la vojaĝo. Ĉiu vojaĝo devas havi sian katastrofon, por ke oni ne ĝin tuj forgesu. Estis por ni aranĝita tagmanĝo en la reĝa palaco kaj vizitoj en la tieaj muzeoj, kiuj normale estas lunde fermitaj. La ŝoforo sukcesis maltrafi la tempon tiel, ke ni ne povis ĝui la

palacan manĝon. En Prago ni ankaŭ volis loĝi en la plej nova kaj bona kampadejo, por ne nur vidi la urbon de la palacaj kaj hotelaj aspektoj, sed ankaŭ de la aspektoj de ordinaraĵoj homoj. Por ke ĉio estu kontraŭ ni tiun tagon, oni ne forigis la rubaĵon. En la vespero tamen kelkaj samideanoj tre bonkore montris al ni la plej videndajn lokojn de la urbo. Tiu tago por ĉiam restos kiel inkubo en la memoro de la vojaĝgvidantino, sed ankaŭ mi memoros la bonkorecon de Marta Šmidrkalová, kiam ŝi savis nian vesperon montrante al ni la kvartalojn de la reĝa palaco (ni ankaŭ vidis la restoracion de ekstere).

La lastan vesperon ni pasigis en okcidenta Berlino. Ankaŭ tie grupo da geesperantistoj nin atendis por agrabligi al ni la tempon. La gejunuloj kun junaj germanoj vizitis la muron. La mezaĝuloj iris en belan dancejon por danci kun la germanoj kaj trinki "ein weisses mit Schuss".

Survoje al Hungario ni havis interesajn studojn pri la lando, eĉ skriban kvizon, kaj multon ni lernis pri la lando kaj ĝia historio. Dum la vojaĝo ni vidis multon kaj travivis multon, kaj ni konstatis, ke ĉiujn lokojn ni volas revidi.

Kiel gvidantino de la grupo mi fine povas diri, ke ĉiuj en la granda grupo tre bone interkompreniĝis kaj ke ni havis tre bonan kaj interesan tempon kune. Mi eĉ kuraĝas diri, ke mi pretas gvidi alian esperantan vojaĝon, sed tiam kun ŝoforo, kiu pli bone trovas la vojon.

**Kerstin Rohdin**

## Kelkaj eroj el la ĉijara UK

Ĉisomere mi travivis la plej grandan esperantokongreson ĝis nun. Pli ol 5000 homoj estis registritaj kaj eble 1000 kromaj ĉeestis. La kongreso estis ankaŭ bele videbla en la urbo, ĉar ĉie estis banderoloj, flagoj, ŝildoj; eĉ la taksioj portis reklamilojn pri la kongreso.


Kiel kutime, estis amaso da kunvenoj, pluraj ekspozicioj kaj tradiciaj vesperaj programoj. Estis tamen pli da kulturaj programoj, speciale teatraĵoj, ol kutime. Estis ankaŭ multe pli da ekskursoj, eble eĉ tro da ili, ĉar tio ŝtelis multan tempon de la kongresa laboro.

Ĉar ne eblas raporti pri la tuta kongreso kaj samtempe doni ĝustan bildon de la tuto, mi elektas nur kelkajn programerojn kaj esperas, ke aliaj homoj raportos pri aliaj partoj de la kongreso.

asocio de UEA, kiu nun havas 45 aliĝintajn landajn asociojn, fariĝis Kuba Esperanto-Asocio. Por ni svedoj estis ĝojige, ke la prezidanto de la sveda parlamento, Ingemund Bengtsson, fariĝis membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

Aro da specialaj komitataj komisionoj laboris dum la kongresa semajno kaj raportis al la komitato. Temas pri landa kaj faka agadoj, pri kulturo, pri edukado, pri informado, pri planado, pri virina agado kaj tiel plu. Ĉijare ni uzis multan tempon por elektoj, ĉar finiĝis la deĵorperiodo de la estraro.

Gregoire Maertens estis reelektita prezidanto. Cetere eniris la estraron por la venontaj tri jaroj: Renato Corsetti, Barbara Despiney, Flora



### La komitato kaj la komisionoj

Multajn horojn mi foruzis por partopreni la laboron en la komitato de UEA. Ni havis 11 kunsidojn kaj 50 punktojn en la tagordo. Nova membro-

Szabó-Felső, Roland Lindblom, Baldur Ragnarsson, Petâr Todorov, Humphrey Tonkin kaj Yosimi Umeda.

La elektoj ne okazis sen problemo, ĉar kelkaj protestis kontraŭ la propono de la

elektokomisiono pligrandigi la estraron je unu membro (de 8 ĝis 9). Post iom da tumulto tamen fariĝis 9 estraranoj.

Mi sekvis la laborojn de pluraj komisionoj, sed en unu mi vere laboris, tiu pri virina agado. Kune kun Anna Brennan, Eliza Kehlet, Loes Demmendaal kaj Julie Tonkin mi helpis plani la programon kaj invitilojn dum la kongreso.

### Kooperativa konferenco

Duonan tagon mi dediĉis al kooperativa konferenco. Estis vere interese sperti tiun programon, ĉar mi antaŭe ne partoprenis en tiu laboro. Kiel sveda kooperativano mi fervore aŭskultis la raportojn el Bulgario, Hungario, Francio kaj Britio kaj aliaj landoj. Pluraj el ili estis veraj esperantokooperativoj, ili do uzas esperanton en sia laboro. La celo de la konferenco estis, ke oni trovu kontaktojn kun kooperativoj en aliaj landoj kaj interŝanĝu spertojn kaj ideojn.

### Ekskurso

Mi partoprenis tutagan ekskurson al norda Hungario, al la naskiĝurbo de la konata esperanto-poeto Kalocsay — al Abaújszántó. Ĝi estis aranĝo de B. Batta, kiu i.a. partoprenis la svedan esperanto-kongreson en Gävle. Kune kun la lokaj esperantistoj li preparis bonegan programon; ŝajnis, ke la tuta urbo estis engaĝita. Infanoj kaj gejunuloj kantis, recitis kaj aktoris, la prezidanto de la konsilantaro salutis kaj tiel plu.


Ĉar temis pri la naskiĝloko de nia fama poeto, la urbo pretigis specialan memorĉambron pri li en la urba muzeo, kaj tiun ĉambron oni inaŭguris ĝuste tiun tagon. Ekster la muzeo oni poste plantis memorarbron kaj per floroj ornamis memortabulon pri Kalocsay.

Post tiu solena programo ni vizitis la famajn vinkelojn en la urbeto, gustumis la same faman tokajan vinon kaj par-

toprenis internacian vinkonkurson. Esperantistoj el diversaj landoj kunportis vinon, kiun profesiaj vinspertuloj gustumis. Gajnis vino el Finnlando!!!

### Rondveturo en Budapeŝto

Ĉar mi ne havis tempon partopreni ekskurson tra Budapeŝto dum la kongresaj tagoj, mi uzis la tagon post la kongreso por tiu celo. Kune kun belga esperantistino, kiu ankaŭ atendis reflugon al sia hejmlando, mi mendis ekskurson per takso, ekipita per sonbendo en esperanto.



Dum iom pli ol du horoj ni traveturis la tutan urbon, dum sonbenda voĉo rakontis pri la historio de la urbo kaj pri la diversaj konstruaĵoj kaj lokoj en la urbo. Ne gravis, ke nia ŝoforo ne konis la anglan kaj nur iom de la germana. Kaj la vojaĝo ne tre multekostis, se mi komparas kun io simila en Gotenburgo.

### Amasoj da ĝeamikoj

Ĉiama ĝojkaŭzo estis, ke mi inter la homamasoj ekvidis gekonatulajn, kaj eĉ por la unua fojo renkontis korespondamikinon el Bulgario. Plej ofte oni havas tempon interŝanĝi nur kelkajn vortojn,

ĉar oni renkontiĝas survoje ien. Sed okazas, ke oni jen kaj jen ŝtelas tempon de iu kunveno por trinki glason da biero aŭ tason da kafo kune kun bona amiko, babilante pri komunaj memoroj kaj promesante baldaŭ skribi.

### La silento post la kongreso

Ĉijare mi ankaŭ spertis la grandan silenton kaj la mankon de multaj homoj ĉe la kongresejo la tagon post la kongreso. La granda placo, kiu kelkajn horojn antaŭe estis plena je homoj, nun estis dezerta kaj morta. La multaj

esperantoflagoj nun donis melankolion anstataŭ ĝojon de atendo. La flirtado de la flagoj diris "Ĝis revido! Ĝis revido! Ĝis iam! Ĝis ie! Ĝis Kanado!"

Märtha Andréasson

### Parlamenta agado

Estis unu el tiuj varmegaj posttagmezoj per kiuj la kongresurbo regalis nin. Aro da reprezentantoj de diversaj landoj kolektiĝis por interŝanĝi informojn pri la parlamenta agado diversloke. Pro granda diferenco inter la diversaj parlamentoj kaj la reguloj laŭ kiuj ili laboras, la alirvojoj

diversas. Progresoj ie iel tamen povas instigi movadulojn kun respondecoj rilate al parlamenta agado agi sammaniere aŭ laŭ paralelaj pli konvenaj vojoj.

La raportoj ĉefe tuŝis la Eŭropan Parlamenton. Jam troviĝas grupo da eŭropaparlamentanoj, simpatiantoj de esperanto, el kiuj plej multaj estas britoj. Grahame eon-Smith admonis alilandanojn, el landoj kiuj reprezentigas ĉe la Eŭropa Parlamento, laŭeble helpi fortigi tiun internacian grupon.

La ĝenerala impresado estas, ke en tiu kampo la laboro tro lamas. Bedaŭrinde, ĉar certe estas tre grava. Iom da lumo donis tamen la paportoj de Brazilo, kie nun troviĝas esperanto-biblioteko ĉe la parlamentejo, kaj de Koreujo. Kiel pruvo de la progresoj parlamentano Kim, la plej fervora el la tri simpatiantoj-parlamentanoj, eestis la kongreson. Dum tiu kunveno li anoncis, ke tiu grupo invitos alilandajn simpatiantojn, kiuj vizitos Seoulon en oktobro okaze de la Interparlamentara Kongreso.

## Memore al Björn Collinder

La honora prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio, profesoro Björn Collinder el Uppsala, mortis la 20an de majo en la aĝo de 88 jaroj.

Post doktora disertacio pri "La finn-lapona kvantoŝanĝiĝo" li en la jaro 1933 estis nomita profesoro pri finnuĝraj lingvoj ĉe la universitato en Uppsala. Per nekalkulebla nombro da lingvosciencaj verkoj, lemolibroj kaj vortaroj li akiris tutmondan fakan reputacion kiel eminenta kaj ideoriĉa filologo kaj lingvisto. Temoj kiel praĝermanaj pruntvortoj en la finna lingvo, parencaj rilatoj inter siberiaj lingvoj, akcentproblemoj en la turka lingvo kaj la kulturo de la svedaj laponoj estas nur kelkaj ekzemploj de lia multampleksa laborkampo.

Post sia emeritiĝo en 1961 Collinder agis kiel gastprofesoro

en Aŭstralio, Aŭstrio kaj Usono, kaj kiel prelegisto pri ĝenerala lingvoscienco ĉe universitatoj en pluraj mondopartoj. Krome li lerte tradukis, interalie la finnlingvan nacian epopeon *Kalevala*, la islandan poezian *Edda*, la antikvan anglan heroan poemon *Beowulf* kaj multajn verkojn de Shakespeare kaj de klasikaj grekaj aŭtoroj, ĉiam en la origina versmezuro. Memkompreneble li ricevis multajn honorajn doktorecojn kaj aliajn distingajojn de sciencaj akademioj kaj societoj.

Jam en sia junaĝo Collinder aliĝis al la esperanto-movado — lia patro estis gimnazia instruisto kaj unu el la fruaj svedaj esperantistoj en la 1890-aj jaroj — kaj kuraĝe atakis la problemon pri la lingva konfuzo. En 1933 li forte kaj kompetente pledis por esperanto en multhora lingva diskuto en la sveda radio, dum la jaroj 1935 — 1936 li prizorgis radian prelegserion pri "La problemo de lingvo internacia" (publikigita en Muusses Esperanto-Biblioteko), kaj plurfoje li kontribuis al la someraj universitatoj. En siaj grandaj verkoj *La lingvo* kaj *Enkonduko en la lingvosciencan* li entuziasme argumentis por la sola praktike uzebla internacia lingvo, nome esperanto. Sveda Esperanto-Federacio nomis Björn Collinder honora prezidanto, kaj UEA elektis lin ano de sia Honora Patrona Komitato.

Kiel persono Björn Collinder estis humila kaj kompleza homo, ĉiam fidela al siaj idealoj kaj vere sincera al siaj multaj amikoj.

Karl Söderberg

## VANCOUVER

1984 års internationella esperantokongress kommer att äga rum i Vancouver, Brittiska Columbia i Kanada. Du gör säkert vad du kan för att vara med! Gör slag i saken redan i år. Avgifterna höjs som vanligt redan den 1 januari. Till den 31 december gäller följande avgifter:

- |  |       |
|--|-------|
| 1. Icke direkt medlem i UEA                                | 479:— |
| 2. Direkt medlem i UEA                                     | 381:— |
| 3. Kunulo/junulo/handikapulo<br>— icke direkt medlem i UEA | 385:— |
| 4. Kunulo/junulo/handikapulo<br>— direkt medlem i UEA      | 191:— |

Beställ anmälningsblankett från Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malö, tel. 040-91 63 09. Blanketten sänds tillbaka till samma adress, idyllid.

Betalning sker till postgiro 14 74 29-5, Esperantoförbundet, Specialkonto.



# Kelkaj linioj pri svedaj kanaloj

Svedio estas tre akvoriĉa lando. Ni havas multajn riverojn kaj preskaŭ cent mil lagojn. Jam en la dekseca jarcento la episkopo Brask en Linköping cerbumis pri la ideo krei akvovojojn tra Svedio de la Atlantiko ĝis la Balta maro. Tio restis nur penso, sed proksimume cent jarojn pli poste "la patro de la mekaniko" Kristofero Polhem, pli serioze okupis sin pri la afero kaj interkonsente kun la reĝo Karlo XII li komencis konstrui kanalon de Gotenburgo al la lago Vänern. Sed venis multaj obstakloj: la morto de la reĝo, malsukcesa milito kun mizero por la loĝantoj. Ĉio tio malfruigis la realigon de la projekto.

La vera kanalkonstrua periodo en Svedio komenciĝis ĉirkaŭ 1780 kaj daŭris ĝis proksimume 1850. Akvotransporto estis pro multaj kaŭzoj alloga alternativo al la transporto per ĉevaltiritaj ĉaroj, sur vojoj tre primitivaj. La akvotransporto kutime ne estis pli rapida, sed bona ŝipo ja povis ŝarĝi cent- aŭ eĉ miloble pli ol ĉevalĉaro; tio signifis multe pli malkaran transporton.

La unua kanalo, kiu pretiĝis, estis tiu de Strömsholm, kiu estis inaŭgurita en 1795. Ĝi kunligis la lagon Mälaren tra pluraj lagoj kun Smedjebacken en Dalekarlio. La ĉefa transportaĵo estis feraĵoj de pluraj uzinoj laŭ la kanalo. Komence la ŝipoj estis velboatoj, t n "sas", kiuj ŝarĝis maksimume 70 tunojn, sed post ekuzo de vaporŝipoj meze de la deknaŭa jarcento montriĝis praktike ankaŭ akcepti paseĝerojn de Dalekarlio al Stokholmo. "SS Strömsholms kanal" Norberg (1864) havis, ekzemple, 22 dormlokojn por pasaĝeroj.

Dum la kanalkonstrua periodo oni pretiĝis multajn kanalojn en diversaj partoj de la lando. El la 176 projektoj preskaŭ ĉiuj estis pretiĝitaj.

Plej grava estis la kanalo komencita de Kristofero Polhem. Post longa paŭzo la reĝo Gustavo III provis rekomenci la laboron en 1772, sed sen rezulto. Dank'al juna maroficiero Baltzar von Platen la unua parto de la kanalo de Gotenburgo al Vänern tamen pretiĝis dum la jaroj 1793 — 1800. Von Platen daŭrigis per granda energio esplori por la alia parto, de Vänern ĝis la Balta

TEMO



maro, i a akcentante la signifon de la kanalo por defendo okaze de milito. En la jaro 1810 la reĝo Karlo XIII donis privilegian leteron, kiu certigis al la kompanio de Göta kanalo la rajton konstrui kaj uzi la kanalon, ricevi grundon por ĝia efektivigo (200 ulnojn) kaj kelkajn arbarojn, el kiuj oni



povus preni la konstrumaterialon. La kompanio ankaŭ ricevis la rajton uzi dungitajn soldatojn kontraŭ pago. En 1822 la parto Vänern-Vättern estis preta, kaj dek jaroj pli poste ankaŭ la lasta parto tra Ostrogotio.

La ŝipoj kutimis ankoraŭ esti pelataj per veloj, tirstoj aŭ homoj. Tial ofte estis (kaj daŭre estas) vojoj sekvantaj la kanalojn, kaj ĉe la enirejoj en lagojn estis longaj digoj por tirado de velŝipoj en la lagon, kie ili povis kapti la venton. Sed en la mezo de la deknaŭa jarcento vaporŝipoj fariĝis pli kaj pli kutimaj kaj la velŝipoj iom post iom malaperis.

Samtempe la kanaloj ricevis novan konkuranton: la fervojojn. Konstruante ilin la ŝtato tamen decidis, ke oni evitu lokigi ilin paralele kun la akvovojoj. La kanaloj do longe havis sian apartan signifon, ekzemple por la fero de minejoj kaj uzinoj en meza Svedio kaj

por multaj meblofabrikoj en Smolando kaj Dalsslando.

Pli fortaj konkurantoj al la kanaltrafiko fariĝis la aŭtobusoj kaj ŝarĝaŭtoj, kiuj aperis post 1920 kaj konstante kreskis laŭ nombro. Pro tio multaj kanaloj perdis sian signifon kiel vartransportantoj; kelkaj tamen pluvivas dank'al la kreskanta turisma trafiko. Tio koncernas precipe la orientan parton de Göta kanalo, de Vänern ĝis Söderköping, kaj la kanalojn de Kinda kaj Dalsslando. Kiel turisttrafikiloj ili ankoraŭ havas tre grandan signifon.

Prizorgado de la kanaloj estas sufiĉe multekosta: pontoj kaj kluzoj postulas deĵorantojn. Por teni la kostojn inte akcepteblaj limoj oni nun aplikas novan sistemon kun aŭtomataj pontoj kaj kluzoj, kiujn oni povas kontroli kaj manipuli de unu stacio per televida sistemo.

Runo Stridell

inter Gotenburgo kaj Stokholmo, nome 56 horoj kaj 30 minutoj. Tio estas 4 — 5 nodoj po horo en kanaligita akvo, kaj per tio la bona libertempulo povas trovi senkomparan rapidecon: li rapidas malrapide.

Ĉu oni ne povus same efike ripozi sur firma tero? Tamen ne: akvo estas akvo, eĉ se ĝi estas nur kanalo, t e akvovojo sur kampo. Kaj lagoveturo donas tri bonajn rezultojn: dormon, maldiligentecon kaj apetiton. La ŝajne senokazaj tagnoktoj surŝipe instruas la plej inteman sekreton de la libertempo: la arton fari absolute nenion sen enuiĝo. Oni travivas la plej naivan ĝojon; la plej idiliajn vidaĵojn, la plej refreŝigan "dolce far niente" [dolĉa neniofarado].

Ekzemple tio pri la kluzoj. Estas konstante sama ceremonio, ripetata proksimume sesdekfoje, sed ĉiun fojon same interesa. Oni pendas sur la apogrelo kaj ĝuas la voluptan dramon vidi aliajn labori, kaj tio laŭ manieroj kaj movoj, kiuj estis samaj jam en la tempo de Karlo XIV. Pezaj kluzpordoj fermiĝas kaj malfermiĝas, kluzpordaj valvoj malfermiĝas kaj refermiĝas, dum la akvo fluas kvazaŭ el la buŝanguloj de la Nikso mem, tumiloj estas tirataj de grizharuloj aŭ de viglaj junuloj, kaj pontoj ruliĝas flanken. Estas vivo plena da intensa streĉo,


## Blua rubando tra Svedio

La sensacioj pri rapideco fariĝis nuntempe tiel ĉiutagaj, ke ili ŝajnas banalaj. Ŝoseaj mejloj, marmejloj, aermejloj — ĉio dance pasas kun sama rapideco, tiel ke la animo ne povas sekvi. Por la vere postulema veturanto restas nur unu rapidensacio de vere alta kvalito: tiu de malrapidego. Sed amikoj de tiu eksterordinara ĝuo estas sufiĉe senhelpaj en la kirlego de la moderna turismo.

Ili tamen havas unu eblecon, eblecon, kiu estos baldaŭ 150-jara. En la nuna trafiko ekzistas du "bluaj rubandoj": unu estas transoceana kaj posedas rapidrekordojn por la distanco Britio — Novjorko; la alia estas sveda kaj temas pri la Göta kanalo, nomata "la blua rubando" de poetoj. Göta kanalo

ne estas pli blua ol "die schöne blaue Donau" kaj la rapideckordo, kiun ĝi havas estas la plej alte notita tempo por regula persontrafiko per ŝipo





kaj ĝi vekas naivan ĝojon pri ruze lerta mekanismo eltrovita en Italio antaŭ pli ol 500 jaroj.


Kaj jen la pejzaĝo de tiu fama akvovojo. Oni surprizigas, ke tiom da belegaj vidaĵoj lokoĝis ĝuste laŭ la kanalo. La veturo gvidas tra bildlibrosimila Svedio en polurita lerneja eldono, Svedio sen malriĉeco, enuo kaj malbela. Ĉio havas poluritan someran fasadon: tio estas patrino Svea en solena vestaĵo. Ŝi havas sian ĉarmon, la maljunulino. Oni sentas sin translokigita reen al la antaŭmilita tempo de nur idilioj (ne malpli, kiam oni vidas la muzean fortikaĵon de Karlsborg). Sed tiu kolorita bildalbumo de la komenco de la 19a jarcento neniam fariĝas monotona.

Se oni veturas orienten, la unua tago ricevas sian stampon de la rivero Göta kaj la lago Väner. Kalvaj, bluj montodorsoj, marĉoj, rivertrafiko kaj vastaj enlandaj lagoj, kelkaj sen videbla landhorizonto. La duan tagon betulaj enfermejoj, abundaj kampoj kaj herbejoj, la arĝente brilanta spaco de Vättern, preĝejoj, kasteloj, Vasaseriozeco en ŝpinanta antaŭtagmeza paco, la kanalo kiel malnova ŝoseo

flankita de bienoj, aleoj kaj kverkoj, tilioj, aceroj, fagoj, fraksoj kaj betuloj, junarbustaĵoj laŭ la fosrando. La vojo estas tiom malnova vundo en la vizaĝo de la pejzaĝo, ke la cikatroj malaperis kaj la kanalo organe kunfandiĝis kun la medio. La trian tagon interŝanĝiĝas ĉarmo kaj grandiozeco, oni glitas tra Slätbaken en

la ŝeraron de Ostrogotio kun malabundaj insuloj kaj kalvaj ŝeretoj en bluan akvon, longaj distancoj inter la domoj, krian-taj mevoj, ekvidoj de libera maro.

Longaj, maldiligentaj, indiferentaj tagoj. Sed aldonu la sensacion de la noktoj. Precipe la veturo dum la dua nokto inter Boren kaj Roksen estas



kvazaŭ feaĵo. Kontraŭ la ĉiela fono, nigra kiel ĉina lako, brilanta de pezaj steltorĉoj, sin desegnas en la akra lumo de la ŝipaj lanternoj parksimila pejzaĝo kun senlime mola skalo de valoroj, distinkte respegulita de la nigre glata surfao de la kanalo. La lanterno pentras bildon post bildo, kiuj laŭsekvaj malaperas malantaŭen en la krepuskon, kaj en tiu sugestplena mondo de romantikaj operkulisoj oni vidas papiliojn kaj tineojn reflekti la akran lumon per siaj blankaj flugiloj, dum ili tiriĝas pli kaj pli proksimen al la tlandiga tumfonto. El la arbaj foliaroj aŭdiĝas koleraj lamentkrioj de strigoj, el la



kampoj leviĝas blekoj de paŝtaŭntaj brutaroj, kaj super la nigra akvo gliutflugas mevoj kaj anasaroj al ombraj anguloj. Kontraŭ la velumnigro de la nokto projektiĝas subite lumaj bienfasadoj, ruĝaj kamparaj dometoj, graciaj somerdometoj kaj kluzgardistaj dometoj en bunta kolorriĉo.

Oni manĝas, dormas, oni sidas en taŭga ferdeka seĝo kaj lasas la pejzaĝon pretergliti, oni ekrigardas gazeton kaj lasas ĝin refali, oni provas interesiĝi pri iu grava afero, sed trovas, ke ne ekzistas indaj objektoj. Fine finiĝas tiu veturo tra daŭra pasinteco ĉe la kajo de Riddarholmen, kie la tursonorilo en la preĝejo de la franciskanoj sonoras vesperpacion al la dormantaj nobelaj palacoj de la tempo de Gustavo II Adolfo, sed kie oni ankaŭ aŭdas la bruon de fervojoj kaj aŭtoj en akra kontrasto kun la sensona trafiko en la kanalo de Göta.

Gustaf Näsström

## La kanalo de Säffle

Jam en 1811 Baltzar von Platen komencis plani pri kanalo de Säffle kaj en 1837 ĝi inaŭguriĝis. Hodiaŭ Säffle estas la pordo de sude al Vermlando, kaj grava centro por komerco kaj industrio. La rivero Byälven, kiu fluas tra Säffle, estas ankaŭ pordo al la lago Glafs-fjorden, kiu penetras 80 km en okcidentan Vermlandon al Jössefors kaj Arvika, la plej interna haveno de Svedio. La distanco Säffle — Arvika estas ankaŭ nomata „la vikinga distanco”. Tiuj akvoj dum pli ol mil jaroj funkciis kiel transportvojo por komercistoj, aventuruloj kaj pilgrimoj. La reĝaj tombontetoj kaj la ferepoko rakontas pri tio.

La kluzregiono de Säffle formas urbetan idilion. Pli proksime al Vänern, ĉe "Duse udde", oni trovas grandan

libertempejon por kampado kun bonegaj banstrandoj kompareblaj al tiuj ĉe nia okcidenta marbordo.



Je la alia flanko de Säffle, nordokcidente, etendiĝas ondiĝanta pejzaĝo. Byälven larĝiĝas kaj formiĝas Harefjorden. Ĉe Nysäter la pasejoj estas malvastaj kaj ĉe Högsäter ni renkontiĝas kun Glafs-fjorden, unu el la plej belaj akvoj de Vermlando. Vastaj kampoj, profundaj arbaroj kaj modernaj kamparaj domoj kaj bienoj flankornamas la bordojn. Glafs-fjorden ne nur estas vasta mirinda akvo. Ĝi ankaŭ logas al fiŝkaptado kaj surbordiĝo. Okcidente de Glava etendiĝas la grandega Glaskogen, naturrezervejo kun signitaj promenvojoj, kanotvojoj kaj blovsirmitaj tranoktejoj.

Arvika prezentas belan naturhavenon por la turisto. Ĝi estas centro por okcidenta Vermlando. Ankoraŭ restas multe da urbeta idilio kun malnovaj lignodomoj, mallarĝaj stratoj kaj verdaj parkoj.

## La kanalo de Dalslando

Neniu alia provinco en nia lando havas proporcie tiom da akvo kiom Dalslando. La kanalo de Dalslando estas la kunliga ĉenero en la trafikebla lagsistemo en Dalslando, Nordmarken en sudokcidenta Vermlando kaj Östfolds fylke en Norvegio. Oni povas pasigi semajnojn sur tiu lagsistemo, sen tamen ĉion vidi pro la amaso da golfoj kaj apudkanaloj.

La kanalo de Dalslando estis inaŭgurita en septembro 1868 kaj ĝi longe estis sufiĉe grava transportvojo por diversaj varoj, kio nun tamen malpliĝis. Kreskis, kontraŭe, la kvanto de libertempaj boatoj.

La kanalo estas malfermita por trafiko ĉiujare de junio ĝis fino de aŭgusto.

Ekzistas multaj vidindaĵoj laŭ la kanalo, ekzemple la

akvedukto ĉe Håverud kaj la kanalmuzeo, la grandaj historiaj ŝtndesegnaĵoj ĉe Högsbyn, la jara somerekspozicio en Långed (arto, slojdo), la liber-tempo ĉe Laxsjön, malnova kampara hejmo en Bengtsfors, kanot- kaj turistcentro apud Årjäng (servado, migrohejmo, kabanoj, kanotinstruejo ktp), la bela preĝejo de okcidenta Fågelvik apud Töcksfors aŭ Ed, kiu laŭ situo estas unu el la plej belaj lokoj en nia lando.

De Stora Lee oni povas preni transporton pere de trenveturilo al Halden kaj la norvega maro kaj kompreneble ankaŭ de Halden al Stora Lee. Depost 1973 estas malfermita nova transportvojo, nome de Näsmark ĉe Stora Lee, kie speciala trenveturila rampo kaj gasthaveno estas aranĝitaj por boatoj ĝis longo de 9 metroj.

varoj de la ĉiam pli grandaj ŝipoj devis esti transportataj per ĉevalĉaroj preter la akvofaloj, por esti reŝarĝitaj sur aliajn ŝipojn.

Per malfermo de la rezervejaj akvopordoj oni povas dum mallonga tempo lasi reaperi la akvofalojn en sia iama impona beleco. "La tagoj de la akvofaloj" daŭras dum kvar tagoj kaj komenciĝas la trian ĵaŭdon de julio.

## La kanalo de Kinda

Jam en la mezo de la dekoka jarcento, longe antaŭ ol pretiĝis la Göta kanalo, prezentigis plano pri akvovojo al suda

Ostrogotio per kunligo de la lagoj Roksen kaj Åsunden. Tiel oni esperis solvi la transportproblemojn, kiuj tiam ĉefe temis pri lignotrunkoj.

Daŭris tamen ĝis 1870 antaŭ ol oni povis malfermi la kanalon de Kinda laŭ ĝia tuta longo, 80 km kun 15 kluzoj, kiuj levas la veturantojn kaj la boatojn de Roksen al la akvospegulo de Jemlunden, 85 m pli alte.

Komence de ĉi tiu jarcento la konkurenco de la fervojoj kaj ŝoseoj fariĝis tro granda kaj je la fino de la unua mondmilito la kanalo preskaŭ finludis sian rolon. Dum la militjaroj 1939 — 1945 ĝi tamen servis por transportado de brulaĵoj al Linköping.

La malnova kanalo hodiaŭ fariĝis ĉarma turistvojo, sed ĝi samtempe fariĝis pli malfacile trafikebla.


## La kanalo de Trollhättan

En la koro de Vestrogotio, ĉe Trollhättan, la rivero de Göta survoje al la maro faras imponan 32-metran akvofalon.

Trollhättan frue atingis internacian famon, ĉar estis malmultaj lokoj, kie oni tiel facile povis rigardi tiel imponan naturfenomenon. En malnovaj svedaj vojaĝrakontoj ĝi havas nur unu konkuranton: la kuprominejo de Falun.

Malgraŭ la grandioza beleco de la akvofaloj la tiutempaj komercistoj pritraktis ilin per malpli da simpatio, ĉar sepdek kilometrojn for de la defluejo de la larĝa rivero prezentigis nevenkebla halto por la boaveturantoj; kaj tio estis despli ĉagreniga, ĉar pasinte la akvofalojn, oni havis konsiderindan distancon da facile trafikebla akvovojo.

Per granda peno oni povis tiri siajn boatojn super la deklivoj en kvietan akvon, sed tio estis tro peza laboro kaj la



# Ny datatidning — på esperanto

Antalet esperantotidningar är numera så pass stort att man mer eller mindre slutat reagera när en ny sådan börjar ges ut. Men under den internationella esperantokongressen i somras i Budapest presenterades en tidning som verkligen förtjänar all uppmärksamhet den kan få. Tidningen heter *Internacia komputado* och vänder sig till datoranvändare i hela världen.

Den kommer, som namnet antyder, att handla om datorer och deras användning, med särskild tonvikt på mikrodatare, eftersom många av dem som använder sig av datorer arbetar just med mikrodatare. Mikrodatormarknaden är också väldigt dynamisk och utvecklas mycket snabbt.

Namnet säger också att det kommer att handla om datorer i hela världen, och försöka föra fram i ljuset vad de stora amerikanska datatidningarna oftast glömmar: datasituationen i sådana länder, som inte deltar i det stora engelskspråkiga informationsflödet, om



datormarknaden i Iran, Sudan och Nya Guinea. Tidningen kommer dock inte att på något sätt försöka förbise de stora amerikanska och japanska marknadernas betydelse för omvärlden, vilket vore meningslöst.

Vilka personer vänder sig egentligen tidningen till? Så här menar man: tidningen skall utgöra ett praktiskt redskap för fackmän att få tag på sådan information som annars skulle vara svår att hitta. Det rör sig alltså till ingen del om en tidning inom esperantorö-

relsen, däremot skall den på ett konkret sätt visa nyttan av esperanto som vetenskapligt-tekniskt språk. Redaktionen slogan lyder: 'En intressant artikel läser man även med ordbok i handen'. Språket skall vara enkelt, dvs använda vanlig ordbildning även för fackuttryck. Målsättningen är att den intresserade icke-esperantisten skall kunna läsa innehållet efter tio minuters grammatikstudier och med en vanlig ordbok till hands.

Man vänder sig alltså i första hand till datoranvändare och i andra hand till esperantister som vill orientera sig inom datavärlden. Detta medför att man måste förutsätta viss förkunskap, så att innehållet kan bli mer seriöst fackmässigt. Därmed är det inte sagt att man riktar sig till enbart datatekniker och programmerare; målgrupp är alla som kommer i kontakt med datorer i sitt dagliga liv och fått litet hum om vad som händer i maskinernas innandömen. Den tekniska nivån kommer alltså att ligga någonstans mittemellan den populära och den absolut vetenskapliga.

Det är förresten fel att tala om *teknisk* nivå, eftersom man inte bara kommer att behandla de tekniska aspekterna av dataanvändning; även de sociala, ekonomiska och kulturella sidorna kommer att tas upp till diskussion. Man kommer att diskutera framtidens samhälle, människors känslor inför datorer och så vidare.

Den sista huvudprincipen, och kanske den viktigaste, är strävan till konkretion: den person som vill ta reda på mer eller kanske vill ta kontakt med en återförsäljare, skall kunna göra det utan att behöva ringa hundra samtal eller skriva femtio brev. Informationen skall finnas i tidningen.

Niklas Gustavsson

[*Internacia komputado* kostar 60 kronor per år. Hör med Esperantoförlaget om de kan beställa åt dig.]

## isae internacia scienca asocio esperantista

estas tutplaneda organizo de fakuloj kaj interesitoj de ĉiuj sciencoj. Ĝia oficiala organo

### scienca revuo

aperas kvarfoje jare kaj enhavas legindajn artikolojn sciencajn kaj popularsciencajn pri ĉiuj temoj. Membriĝu! Kotizo por 1983: 73 svedaj kronoj. La jarkolektoj de *Scienca revuo* de 1978 ĝis 1982 estas ankoraŭ haveblaj.

Delegito por Svedio: Christer O. Kiselman, Tuvängsvägen 38, 752 45 Uppsala. Poŝta ĝirkonto 55 57 35-0.

# Europaklubben gillar esperanto

Det som här följer är ett utdrag ur en intervju i nr 6-7 1983 av månadstidningen *Monato*. Det är en tidskrift som tar upp både allmänna och vetenskapliga ämnen och som lägger vikt vid att innehållet från första början är skrivet på esperanto. Intervjun råkar handla om Europa-Gemenskapens språkliga problem.

Intervjuoffret är doktor Wim de Smet, sedan den 1 januari 1983 ordförande för Europaklubben eller "Sällskapet för språkgränsöverskridande europeiskt samförstånd".

*Fråga: Vad gör du i Bryssel?*

De Smet: Jag leder en avdelning i ett betydelsefullt nationellt vetenskapligt institut. Jag är zoolog och för mitt fack måste jag kunna flera språk, och detta har sedan många år fört mig till medvetande om det språkliga problemet. Dessutom tillhör jag en generation som har måst kämpa mycket för att försvara sitt eget språk, den flamländska varianten av det nederländska språket, i den egna nationen, Belgien. Och sedan länge är jag medveten om att Europagemenskapen riskerar att råka i samma språkliga strider som Belgien haft under årtionden, om man inte snart söker allvarliga lösningar på dess språkliga problem. Därför beslöt jag att understödja Europaklubbens arbete och vill bidra till dess framgång.

*Men gör inte esperantoorganisationer redan det?*

Både ja och nej. Esperantoorganisationerna är till för esperantos framgång i hela världen. Europaklubben strävar å ena sidan att försvara de egna språken, som människorna i Europagemenskapen talar, men å andra sidan är man medveten om att det bästa vore

tillkomsten av något allmänt accepterat och helst lättlärt språk, som utan att tillhöra en viss nation kan användas som ett andra språk.

Under många år har Europaklubben inte utpekats vilket detta språk borde vara, men i praktiken har man använt esperanto. Men det sista årsmötet gjorde slut på detta dubbeltydiga tillstånd och man accepterade esperanto (som mellanspråk). Det finns dock bland Europaklubbens många, som knappast eller inte alls talar eller förstår esperanto, men man är ense om att det måste finnas en lösning.

*Du talar öppet om esperanto, medan detta namn inte används i Europaklubbens många skrivelser, utan man talar i stället om det internationella språket, eller helt enkelt om "hjälpmedlet".*

Just det, du rör vid en oangenäm punkt. Jag har fått överta en bestämmelse som jag aldrig samtyckt till. En av mina föregångare blev övertygad att man helst borde undvika termen "esperanto", som i en del medier väcker hån eller motsägelser, och borde i stället tala om "hjälpmedlet". Med beklagande upplevde jag att det senaste årsmötet i Europaklubben godtog beslutet, att man skulle undvika termen "esperanto", och att man skulle använda termen "hjälpmedlet" i Europaklubbens dokument. Jag måste därför bruka denna beteckning under vissa omständigheter, men under andra förhållanden tvekar jag inte att använda beteckningen "esperanto".

*Har du verkligen förhoppningar om esperanto i europeiska medier?*

Varför inte? Varje ytterligare år är ett ytterligare år av

ytterligare komplicering av det språkliga problemet i Europagemenskapen. Alltså blir kostnaderna högre och tveksamheten större hur man ska kunna finna en vettig lösning genom de nuvarande språken. Så sakta och vackert avtar likgiltigheten, misstron och motståndet mot den lösning som vi föreslår. Till och med de högsta instanserna, när det gäller översättningstjänster, har fått upp ögonen, och man visar ett tveksamt intresse för den intill nu ignorerade lösningen. Detta nya fenomen beror inte bara på de ständigt ökande kostnaderna hos det nuvarande systemet, utan också på det seriösa sätt på vilket de blir informerade om esperanto. Så länge som informationen om esperanto bestod av brev med många gröna stjärnor utan värdefullt innehåll, kunde de europeiska instanserna inte visa intresse för esperanto. Men nu, när dessa samma instanser och medlemmarna i Europaparlamentet får värdefulla och välgjorda dokument från Europeiska Esperantocentret, och när det redan finns en grupp av esperantovänliga parlamentsmedlemmar, och när man blir mer och mer medveten om att ett lätt och logiskt språk väl kan tjäna som brospråk, särskilt för automatisk översättning, så har situationen förändrats i viss mån.

*Europaklubben kan alltså göra mycket på detta område.*

Det är klart. Men vi kan inte framgångsrikt påverka utvecklingen förrän vårt medlemsantal blir större. Om alla, som är medvetna om att lösningen på språkproblemet i Europagemenskapen kan ske genom esperanto, blev medlemmar i Europaklubben, så kunde vi åstadkomma mycket. För detta behöver man inte själv behärska esperanto.

Längre fram i intervjun påpekas att Europaklubben har 500 medlemmar och att detta antal måste ökas.

*(Översättning och sammandrag av Gustav Stenholm)*

## Ordbok på swahili

I år kommer den första esperantoordboken på ett rent afrikanskt språk ut — på swahili. Författare till ordboken är den holländska professorn Jan Knappert, specialist på just afrikanska språk, om vilka han skrivit ett tjugotal böcker och hundratals vetenskapliga artiklar.

Swahili är Tanzanias och Kenyas officiella språk. Man räknar att få betydligt större intresse för esperanto i dessa länder nu när det finns en ordbok.

## Nyheter från Korea

Korea har haft esperantister sedan tjugotalet; däremot har den organiserade esperantoaktiviteten varierat i högsta grad. Ett markant uppsving kan man märka sedan tio år tillbaka: Sydkoreas esperantoförbund har ett högt anseende i landet; det leds av Jhian Chun-sik, rektor för Dankuk-universitetet i Seoul; dess tidning *La espero el Koreujo*, en lyxig fyrfärgspublicering, ges ut med ekonomisk stöd från Koreas utbildningsdepartement. Besökare märker särskilt det dominerande inslaget av unga på alla arrangemangen.

I år har en ny koreansk esperantoordbok getts ut, på nära 500 sidor.

## Fakbok om judo

Från Tjeckoslovakien kommer den nyaste fakboken på esperanto — den handlar om judo! Kanske inte vardagsäm-

ne för så många, men *La transdorsoĵeto*, som författarna kallat sin bok, är en praktisk lärobok i judo, där även alla fakuttryck fått sin esperantiform.

## Talmannen tar emot

Den 19 maj tog riksdagens talman Ingemund Bengtsson emot dr Flóra Szabó-Felső, det internationella esperantoförbundets generalsekreterare. Ingemund Bengtsson hade föreslagits till medlem i UEAs hederskommitté (och sedermera antagits vid årets interna-

tionella esperantokongress i Budapest).

Samtalet fördes hela tiden på esperanto och handlade bl a om vissa förberedelser inför esperantos 100-års jubileum 1987.

## Järnvägsmän i Belgien

Oostende blev årets kongressort för järnvägsesperantisternas internationella organisation. 435 delegater samlades för att diskutera gemensamma fackliga frågor.

# DAGS FÖR UEA

Nu är det dags igen att betala årsavgiften till UEA. Gör det i god tid, så hjälper du både dig själv och UEA.

Välj rätt avgift:

**MA-medlem**, dvs medlem med både årsbok och tidningen *Esperanto*, ett måste för alla aktiva esperantister

200:—

**MJ-medlem**, dvs medlem med enbart UEAs årsbok

80:—

**SZ-medlem**, dvs medlem i *Societo Zamenhof*. Denna avgift betalas utöver ovanstående avgifter. SZ-medlem blir stödjande medlem i UEA. Vi svenskar, som har möjlighet att betala till andra länder, och som har råd att betala, kan genom denna extra avgift göra en god insats för att hjälpa den internationella organisationen.

400:—

**INDIVIDUELL MEDLEM MA eller MJ t o m 25 år blir automatiskt medlem i ungdomssektionen TEJO och får utan kostnad kontakto.** Sådan medlemmar ska anteckna MA-K eller MJ-K på inbetalningstalongen. Andra medlemmar kan prenumerera på *kontakto* för 60 kronor per år.

Inbetalning sker till postgiro 14 74 29-5, Esperantoförbundet, Specialkonto. Förfrågningar kan göras hos Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, telefon 040-91 63 09.